

## ILEI raportas

2015-04-15

Raportas la prezidanto pri trimonata agado de 2015-01-15 ĝis 2015-04-15

### Revuoj

**IPR** *Internacia Pedagogia Revuo* aperadas sub la gvido de Jozefo Nemeth. Iuj personoj levis la demandon pri redaktaj gvidlinioj kaj laborigo de la Scienca Komitato (SK) de IPR. Jozefo Nemeth atentigas pri la redaktolimoj; se ni submetas tekstojn al la SK, chu la revuo povos aperi ĝustatempe... Debato plu iras ene de la estraro.

**JA** *Juna Amiko* aperos kvarfoje dum 2015 laŭ decido de la Komitato de ILEI en julio 2014. Stano Marcek bonege laboras. Skipo liveras materialon.

### 48a Konferenco 2015 en Belgio

Ĝi okazos de la 17-a ĝis la 25-a de julio en **Oostende**, Belgio, antaŭ la centa UK en Lille, Francio. Agema loka grupo eklaboris kuraĝe kaj efike kunlabore kun nia estrarano pri Konferencoj Radojica Petroviĉ. Invito iris al diversaj ministroj de diversaj belgaj regionoj. Okazos simpozio sub la gvido de Kristin Tytgat kaj publika lingva festivalo. Akceptita konferenca temo estas: *Grandan pacon post la grandaj militoj*. Kiel novaĵo en la konferenca programo estas proponataj kursoj por komencantoj kun rabato por la grupa gvidanto. Okazos seminario por lertigi geinstruistojn. Pro la granda kaj grava UK multaj homoj venas de ekster Eŭropo kaj venos al Oostende antaŭ UK; el tio ni antaŭvidas grandan Konferencon. Ĝus nun okazas granda laboro por prepari la diversajn invitleterojn por tiuj, kiuj bezonas vizon por atingi Belgion, kaj granda laboro por rikolti la kandidatiĝon de diversaj ekstereŭropaj personoj, kiuj deziras financon subtenon de ILEI. Diskutoj okazas nun kaj decidoj venos tre baldaŭ. Bedaŭrinde la atendolisto estas pli granda ol niaj financaj fortoj. Informoj troviĝas tie: <http://ilei.info/index.php?lingvo=eo>

### UK Lille

Ekzamensesio por blinduloj okazos kadre de UK, organizita de ILEI. Ĝi estas sistemo de ILEI. Regularo legiĝas sur la retpaĝo [www.ilei.info](http://www.ilei.info).

ILEI havos budon dum UK.

ILEI zorgos pri la Tago de Lernado prezentante diversajn prelegojn pri pedagogio. Preparlaboroj estas survoje, sub la gvidado de Marija Belosevic.

### Venontaj Konferencoj

**Nyíregyháza** (HU) gastigos nian 49an Konferencon en 2016 post UK en Nitra (SK). En **Bjelovar** okazos poste la unua ILEI-festivalo de Esperantaj kulturo kaj pedagogio.

Mirejo Grosjean vizitis en Togolando lertigejon por kamparanoj INFA en Tove. Laŭ kolegoj en Togolando tie povus okazi Konferenco en 2017. Fotoj videblas sur la mireja blogo <http://mirejo3.blogspot.ch/2015/01/infa-de-tove-kpalime-togo.html>. Aliaj lokoj eblas kaj en Togolando kaj en Senegalio. Estas intenco de TEJO kaj ILEI organizi sian ĉefan renkontiĝon en Afriko en la jaro 2017. Esplorenda afero.

## Vivo de la Ligo

**Membroprizorgado** iris al Sebastian Cyprych (Pollando) laŭ decido de la estraro, por malŝarĝi Magdalena Fejficova, kiu malsanas. Li estis nomumita “komisiito” pri membroprizorgado.

Mi sendis **salutmesaĝon** al unu organizanto de kurso en Ĉinio.

**Elekta Komisiono** La nova Elekta Komisiono konsistas el Aurora Bute, Monique Arnaud kaj Synnöve Myttinen. Laboro kaj esploroj antaŭeniras. Nia nuna **estraro** finas sian mandaton, konsekvence la EK devas rilati kun ĉiuj membroj kaj kun novaj personoj, por krei novan efikan estraron por la mandato 2015-2018. En tiu ĉi jaro 2015 ankaŭ la Internacia Ekzamena Komisiono devas esti reelektita kaj aprobata de la Komitatoj de ILEI kaj de UEA.

Kandidato por **Honora Membreco** aperis subite kaj kun forta subteno: nia vic-prezidanto Zsófia Kóródy, kiu raportis pri sia agado en interkultura kampo kadre de kontaktoj en la partnereco Herzberg (DE) kaj Gora (PL). La elekto okazos dum la Konferenco en julio 2015, se la kandidatigo evoluas laŭstatute.

Venis bezono, ke niaj membroj povu akiri **membrokarton**. Diskuto kaj pripensoj survojas. Modeloj aperas.

## Tutmonda Kolokvo pri Instruado de Esperanto (TTK), 13-an ĝis 16-an de majo 2015 en Svislando

Tri instancoj svisaj decidis subteni la eventon per sume 5500 CHF. Plie la Kantona Registaro kaj la Turisma Oficejo helpas per senpagaj servoj.

Brila malferma ceremonio estas en preparo kun salutado, paroladoj kaj prelego, sen forgesi iom da muziko. 12 prelegantoj el 10 landoj venos kaj parolos ĵaŭde la 14an kaj vendrede la 15an de majo. Tri profesiaj interpretistoj tradukos ĉion de Esperanto al la franca kaj inverse. Ekspozicio de libroj en Esperanto okazos, libroservo funkcios. Afiŝoj videblos kaj informiloj estos je dispono.

Honora Komitato brilas kun 31 personecoj, inter ili la Prezidanto de la Tutsvisa Komisiono de la Kantonaj Edukministroj, do nia “edukministro”.

Kontaktitaj lokaj fakuloj ne konsentis prelegi.

La sabata parto okazos en La Chaux-de-Fonds en la Urba Biblioteko.

Partoprenantoj estas malmultaj. Nepre konsciiĝu pri la graveco de la evento kaj venu al la kantono Neuchâtel!!

La pria retejo estas [www.ilei-mondo.info/ttk](http://www.ilei-mondo.info/ttk)

## Kontaktoj kun movadaj asocioj

**ILEI decidis subteni la agadon de HORI Jasuo “Esperanto-Sumoo”**. Aperis voko en nia retejo kaj en nia revuo. Legi ligas al nia kulturo kaj lertigas la leganton. La marta sesio superis la antaŭajn nombrojn; ĉu ILEI kontribuis al tio? Eble jes.

Kontaktoj kun **UEA kaj TEJO** estas oftaj. Mi liveradas instruprezentojn por la reteja aktivula maturigo de TEJO.

Nova plano kun **UMEA** survojas (vidu suben).

Planata estas kunlaboro kun **ISAE** laŭ decido de la Komitato en 2014, tamen nenio vidiĝas ĝis nun. La kontrakto inter ILEI kaj IFEF povus esti modelo.

La **Fondaĵo Hans** el Nederlando ĉesis sian aktivecon kaj transdonis sian havaĵon al ILEI kun la peto observi la celojn de tiu Fondaĵo. La ĉefa celo de tiu Fondaĵo estas lertigado de geinstruistoj en Afriko.

## Kontakto kun ekstermovadaj institucioj

### UNESKO

Nova rubriko aperas en IPR: ILEI-UNESKO, por flegi la kontaktojn, konigi Unesko-n al niaj membroj, stimuli la kontaktojn en la unuopaj landoj. Rubriko pri Unesko ekaperas en nia retejo ilei.info en la paĝo “Dokumentoj”. Flegi la kontakton kun Unesko estas decido de nia Komitato en Montevideo. La 4-an de marto 2015 foriris 3 sloganoj, 3 proponoj de frapfrazoj por la seula Konferenco de majo 2015 okazigita de Unesko. La 6an de marto 2015 foriris 14-paĝa raporto pri la laboro de ILEI kadre de Edukado por Ĉiuj.

Projekto **por virinoj** en Benino. Lanĉita de “Scio Sen Bariloj” ĝi okazis en januaro en Kotonuo danke al malavara donaco de tri personoj en nia movado; partoprenis 11 junulinoj. Staĝo tutsemajna en formo de studcela kunloĝado. Dua tia staĝo okazis en februaro kun 15 junulinoj pro subteno de ILEI kaj aliaj. La programo estis: Eo matene, posttagmeze instruis fakulo pri loka lingvo fonua kaj ĝia skriba formo, kaj virina kapabligo kaj kuraĝigo (fr: capacitation, leadership féminin; en: empowerment, women leadership), tiuj diversaj kampoj plej trafe kongruas kun la postuloj kaj celoj de Unesko: agadi en Afriko, agadi por virinoj, agadi por Edukado por Ĉiuj. Tiuj du projektoj estas “loka agado” (fr: travail de terrain; en: grassroots actions). Tio valore kompletigas la informojn en IPR kaj en la retejo en niaj naskiĝontaj rilatoj kun Unesko.

**Urbo Herzberg**. Tie estas Fondaĵo, kiu okupiĝas pri la ligo inter la urbo kaj nia movado. Mi elektiĝis ene de la fondaĵa komisiono en marto.

**Programoj de Eŭropa Unio.** Okazas, ke iuj personoj povas partopreni kunvenojn danke al subvencioj de EU. Ekzemple danoj povos veni al Oostende per tia subteno.

## Agadoj

**Premio La Torre** Unu persono kandidatiĝis. Laŭ la elektita temo ĵurio elektiĝis. Anonco sekvos en julio.

**Nova projekto:** Ĉinio: instruado de Eo al infanoj, kiuj ricevas specialan instruadon. Sinjorino YU, kiu partoprenis la Konferencon en Montevideo, proponis lanĉi ion tian. Temas pri infanoj kun aldona arta programo en muziko kaj danco kaj luktarto taekvondo. La komenco de la kurso okazis la 8an de marto 2015.

**Nova projekto:** Laŭ raportoj, kiujn ni kelkfoje aŭdis de medicinistoj, (ekster nia movado), kiuj partoprenis internaciajn helptaĉmentojn okaze de katastrofoj, ekzistas bezono pri komuna lingvo en kazo de komuna laboro en katastrofaj regionoj kiel ekzemple en Haitio en 2010. Dr Klawe, prez de UMEA, kaj mi pripensas pri agado al NROj de sukuristoj, kiu enhavos kurson kun limigita kaj preciza enhavo, du lernolibrojn kaj ekzamenon. ILEI kaj UMEA kunlaboras kaj proponas la nomon **SUPER** "Sukuristoj Per Esperanto Reagas.". Enhavo maturiĝas, kontaktoj en Haitio arigās. Adresoj kolektiĝas. Informoj sekvos.

**Subteno el Urugvajo** La estraro de ILEI decidis kontribui al la alveno de Sinjorino Sonia Risso el Montevideo (kune kun la bretona federacio), kiu brile organizis nian Konferencon en 2014. Ŝi alvenos al Svislando jam la 10an de majo kaj helpos dum la TTK. Poste ŝi turneumos en Bretonio. Meze de julio ŝi atingos Oostende kaj laboros por ILEI dum la Konferenco, same dum UK. La taskoj ne mankos por ŝi.

## Farendaĵoj

Mastrumi paralele la ĉiutagajn taskojn, la organizon de la Tutmonda Kolokvo, la organizon de nia ĉiujara Konferenco, la esplorojn pri la venontaj eventoj, la aperigon de du revuoj, tio komplete eluzas la energion kaj tempon de la aktivaj estraranoj. Diversaj ideoj kaj projektoj estas en atendo.

Atendas Interkulturo, eldona agado, ligo al Unesko, instruista trejnado kaj diplomigo, universitata agado, renovigo de la retejo [www.ilei-mondo.info](http://www.ilei-mondo.info), kunlaboro kun ISAE... Fakte ni ne povas bone plani nun, sen koni la konsiston de la nova estraro.

Esperable naskiĝos agema estraro en Oostende, ILEI bezonas tion!!

2015-04-15 Les Brenets, CH

Mireille Grosjean

Prez. de ILEI